



LaSuda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio:

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 126 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. Decembro 1930.

NEKROLOGO.

Sinjoro J. G. Pyke.

Je la 15a de oktobro, revenante de la Oksforda E. Kongreso, nia kara samcelano perdis la vivon de sur la ŝipo Balranald ie en la Mediteranea maro. Li havis la aĝon de 55 jaroj.

Li estis eble la plej bone konata Aŭstralia Esperantisto en Eŭropo, kien li vizitis tri fojojn. Ĉien li portadis, kiel veran vigligilon, sian ĉiamfreŝan spritecon kaj bonhumoron, sian facile verŝan fluon da spertrakontoj.

Sed kune kun tiu facilkoreco kaj gaja ekstero sidis en li pura sentemo, volo strebi al la idealo. Forte li sentis la maljustecon, ĉu inter nacioj, ĉu inter sociaj klasoj. Dum vizito al Germanujo antaŭ du monatoj li sentis akran doloron, kiam li vidis kiel mizeraj estas la kondiĉoj sub kiuj vivas multaj laboristoj. Liaj plezuroj estis plej simplaj: marŝo tra la kamparo kun amikoj, legado de literaturaj libroj, ĉeesto ĉe prelegoj artotemaj, kaj eble antaŭ ĉio la teatro, kiun li pasie amis. Dum la ĵuspasinta vizito al Anglujo li preskaŭ ĉiutage alestis prezentadon. Laŭ mieno ĉiuj lin bone konis. Nature gaja kaj preta fari ion ajn por amuzi la samideanaron, li, tamen, kiel ofte okazas ĉe tiaj homoj, de tempo al tempo serioziĝis; nubo kovris lian frunton, kaj li fariĝis neparolema. Neniam li povis kaŝi sian malaprobion, kaj persono, kiu pekis kontraŭ li, tuj sentis aŭ frostotreman malvarmecon aŭ kolereg-uraganon, sed ambaŭ rapide forpasis.

Dum la 12-jara vivo Esperanta de s-ro. Pyke, li plejgrandaparte okupis la prezidantan seĝon en iu aŭ tiu Esperanta Asocio. Societo aŭ Klubo.

Neforgeseblaj por la klubanoj estas la monataj kampfestoj, kiuj okazis ĉe la fruktarbejo de lia nevo ĉe Ringwood. La promenoj en la arbaro, la gajspirtaj temaĝoj, la plezuro de l' danco laŭ-

takte de eluzita gramofono disko, la rideksplodoj de tiuj, vidantaj por la unua fojo s-ron Pyke, kiel ŝaradiston!

S-ro Pyke ĉeestis la unuan Aŭstralian E. Kongreson ĉe Adelaide, la duan ĉe Melburno, la trian ĉe Sidnejo, kaj la kvinan ĉe Melburno.

Esperanto ĉiam kroĉis kare al la koro de nia perditio. En 1922, kiam starigis Pyke's Bookshop, ĉe 212 Swanston-str., li tuj decidis doni al ĝi subtitolon "Esperanto Book Supply," kaj sur la ekstera muro en grandliteroj li metis avizon "Esperanto Books." Kiom Esperanto ŝuldas al tiu butikoj malmultaj scias. Esp-istoj el aliaj ŝtatoj kaj landoj trovis en Melburno centran lokon, kie ili povis havigi al si helpon kaj ĝui konversacion internacilingve. Vizitantoj el kamparo kaj studentoj, kiuj ne povis ĉeesti la klubon, venis por konsilo kaj ekzerco je la lingvo.

Ĉe la Helsinki kongreso oni decidis fari monkokolekton por starigi monumenton sur la tombo de Zamenhof. S-ro Pyke iĝis oficiala kolektanto por Aŭstralio, kaj kiel rezulto de lia energia laboro ĉi tiu lando okupis duan lokon sur la listo de donacintoj. Granda Britujo estis la sola lando, kiu pli malavare donis. En 1927 s-ro Pyke havis la honoron fari la unuan parolon ĉe la malkovro de la monumento en Warsaw.

Pro sia amo al la teatro estas komprenebla tio, ke s-ro Pyke ("Ezoko") kelkafoje sin okupis verkante drame-tojn en Esperanto. La plej konata el liaj verkoj estas "La Amigilo," kiu, krom kelkfoja prezentado en Melburno, ankaŭ estis ludita ĉe Kopenhago kaj Parizo. Inter la Esperantaj trezoroj ĉe la hejmo de s-ro Pyke estas karto, per kiu la geaktoroj, kiuj partoprenis la prezentadon ĉe Kopenhago sendis salutojn. "La Amigilo" estis presita en "La Revuo," eldonita en Parizo sub redaktoreco de d-ro Zamenhof. Aliaj

teatraĵoj prezentitaj en Melburno estas:—"La Akvo de l' Forgeŝo," "La Koro de Maria," "Iun Belan Tagon," "Balboni, Mansfeld kaj Vojecek, Bankieroj." S-ro Pyke ankaŭ kunlaboris kun s-ro A. L. Sullivan en verkado de "Dum Ŝi Vivis," melodramo prezentita multfoje, kaj nepre venigante proridajn larmojn al okuloj de la aŭdantaro. "Dum Ŝi Vivis" estis tradukita en la anglan kaj ludita sub la titolo, "As Long as She Lived, or Twice Killed."

En 1921 li vizitis, kune kun s-ro Rawson, la 13an Int. Kongreson ĉe Praha. Antaŭ kaj post la kongreso li iris en Nederlandon, Germanujon, Ĉeĥoslovakion, Hungarujon, Aŭstrion, Svisujon, Francujon, kaj Danlandon, revenante al hejmo tra Kanado. Duan vojaĝon li faris en 1927, kiam li reprezentis Aŭstralion ĉe la Danciga kongreso. Antaŭ la kongreso li aliris Svedujon, Norvegujon kaj Finlandon, kaj post ĝi li vizitis al Pollando, Rumanujo, Bulgarujo, Turkujo, Sudslavio, kaj duafoje al Germanujo. En junio nunjara li forlasis la hejmlandon, akompanate de s-ro Hussey, por reprezenti nin ree ĉe Oksfordo. Sed pro siaj propraj klopodoj li okupis pli gravan rolon ol antaŭe, ĉar krom la Esp-istojn li reprezentis ankaŭ la ŝtatan edukan departementon de Viktorio. Postkongrese li aliris en Germanujon por la tria fojo kaj por la dua Svisujon kaj Francujon.

En leteroj el fremdlando li diris, ke la vojaĝo denove montras neceson havi internacian lingvon, kaj taŭgecon de Esperanto por tiu rolo. Ĝis la tago antaŭ ol li forlasis Anglujojn li okupis sin pri Esp-aj aferoj. S-ro Hughes ricevis leteron kaj gazeton pri radio, s-ro Rawson artikolon pri la lingvo verkitan de prof-o Collinson. Eĉ surŝipe li laboris. Amikino kun li vojaĝanta diris, ke li donis al ŝi jam kelkajn lecionojn. Esperanto estis nedisigeble teksiĝinta en lian vivon. Jen la sekreto de lia entuziasmo. La Esperantistaro jam alte taksas sian perdon, sed ĉu plene, ĝuste? Estas dubinde. Nun ili sentas la foreston de bonkora, aminda kunulo; kun la forto de la tempo ili sopiros arde la energion de tiu trankvile flama laboranto por nia sankta celo, ĉiam preta helpi, ĉu konsile, ĉu mone.

Tiuj, kiuj persone konis s-ron Pyke, ne povas ideo malasociigi lin de la klubo. Mil aferetoj konstante rememorigas nin pri li. Tial la klubo estu

lia monumento. Ni laboru, por ke ĝi estu inda je tiu viro.

IN CONDOLENCE.

With great regret we have to record the passing, on 4th September, of Mr. John Byatt, of Hawthorn-grove, Hawthorn, secretary of Ridley College, and formerly senior inspector of the Education Department. The late Mr. Byatt was aged 67 years, and was educated in London. For two years he was a useful member of the Melbourne Esperanto Society, which body, in company with all who knew him, expresses its sincere condolence to his widow, his daughter (Miss Alison Byatt), his son (the Rev. Frank Byatt) and to his brother, (Mr. J. Byatt, president of the Westralian Esperanto Society).

KRONIKO.

Masterton, N.Z.—La grupo antaŭeniras forte sub gvido de senĉese laboranta s-ro A. Dewar, D.B.E.A.

S-ro Tooley, el Christchurch, vizitis nin ĉe kunvenoj, kaj instrue helpis. Vizitantoj ĉiam estas bonvenaj.

Pro tregrava malsano de s-ino L. Payne, nia antaŭa sekretariino la grupo, pro respekto, ne okazigos sian festvesperon jarfinan.

La du ĉi-urbaj taggazetoj enhavis en la unua dusemajno de novembro 48 kolorojn pri Esperanto. Unu artikolo perlume de s-ro Dewar estis repesita kiel cirkulero kaj disdonita al interesatoj.

Ses ges-roj vizitis la grupon en oktobro.

Perth, W.A.—La ĉi tiea societo ankoraŭ bone funkcias, spite al la tiel-nomitaj financaj malfacilaĵoj. Kvar novaj anoj aliĝis la lastan kunvenon; nune tri grupoj, gvidataj de s-roj Miller, Saar kaj Byatt, studas nian lingvon. Lastatempe ĵurnalo "Sunday Times" presigis artikolon pri Esp. kaj la Oksforda kongreso, ankaŭ la "West Australian" enhavis pri la Islanda mil-jara festo interesan artikolon, tradukitan de nia sekretariino, s-ino Sainsbury. Tiel oni sciigas al la homoj, kiel taŭgas nia lingvo por disvastigi novaĵon el malproksima mondparto. Tiel oni altiras publikan atenton al tio, ke oni ja uzadas Esp-on en la ĉiutaga vivo.

Pasintmonate ĉe kunveno de anoj de U.E.A., s-fo Caine abdikis sian oficon kiel delegito por Perth. Antaŭ dekkunaroj s-ro Caine alprenis delegitecon, kaj de tiu tempo ĝis nun agis vigle

kaj fidele. La anoj unuanime petvokis s-ron Saar esti anstataŭanto; s-ro Casey kaj Byatt, nome de la anaro, elkore dankis al s-ro Caine pro sindona laboro lia, kaj multe gratulis s-ron Saar pro enoficiĝo. Ĉiuj opinias, ke la nova delegito streĉe faros la eblon varbi ankoraŭ novajn subtenantojn al la U.E.A.

Sidnejo, N.S.W.—S-ro Rutland kaj ges-roj Hart jam revenis de vojaĝo al Eŭropo. La klubo ilin bonvenigis per speciala festvespero, ĉe kiu ili rakontis al membroj pri la kongreso en Oksfordo.

En novembro vizitis la klubon s-ro Maurice Hyde, el Brisbano, kaj s-ro C. W. Ballard, el Melburno.

Klubanoj nun havas korespondan fakon kaj kunigas dum duonhoru el la ordinara klubkunveno, por montri unu al la alia leterojn, p. kartojn ktp., kiujn ili ricevis, kaj por disdoni alilandajn adresojn.

Melbourne. — Lastmonate s-ro P. Hudson faris interesan paroladon pri la kotona industrio. Priskribinte la kreskigon kaj aspekton de kotonarboj, li detale klarigis la fabrikadon, informdonis pri la landoj taŭgaj por ĝia kulturo, kaj ĝia komerca valoro en la merkato.

De la 11a de nov-o la Melburna Esperanto-Societo kunvenas en nova ĉambro, nome ĉe Scots' Church Hall, 97-101 Russell-str. Tute taŭga, oportuna, kaj komforta, la nova renkontejo tre plaĉas al klubanoj.

KURSO PER TRADUKADO
(kondukanto, s-ro G. Gordon, F.B.E.A.; sekretariino, f-ino Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melbourne, E.10.)

TRADUKO 13
KAPITANO CHARLES STURT,
aŭtoro kaj landesploristo.
(de L.G.L. en "The Age," Melbourne, de la 31a de Majo, 1930a.)

Se laŭdado de la posteularo aŭdiĝas trans la tombo, ĝi estas la unua honoro ricevita de multaj herooj. Kapitano Sturt oferis (1) la plej bonajn jarojn de sia vivo al la esplorado de la internlando de Aŭstralio je la kosto de siaj sano kaj vidadado (2), tamen ĝis lia morto oni ne alte taksis lian laboron.

Charles Sturt naskiĝis (3) en malgranda vilaĝo nomata Chunar Ghur la dudek-okan de Aprilo en la jaro dek-

sepcent-naŭdek-kvina (4) Kiam li estis kvarjarulo, lia patro, juĝisto en la servo de East India Company (5), sendis lin al parencoj en Angiujo, kaj tie li ricevis instruon, unue en privata lernejo en Astbury kaj poste en gimnazio en Harrow. Estante apenau dek-okjara li elektis militistan karieron kaj fariĝis "ensign" (duaranga leŭtenanto) en la tridek-naŭa regimento de la infanterio. Tiu regimento batalis jen en Kanado jen (6) en Eŭropo kaj poste estis sendita en Irlando por subpremi ribelon de la "Whiteboys" (pron. hujtbojs). Servante (7) tie li renkontiĝis kun John Harris, soldat-servisto, kaj tiu poste akompanis lin en ĉiuj liaj esploradoj en Aŭstralio.

En la jaro dek-okcent-dudek-sesa Sturt, jam kapitano, ŝipveturis kun taĉmento de sia regimento, eskortanta (8) pune transportatajn (8) krimulojn al Nova Sud-Kimrujo. La unua impresio sentita de Sturt pri Aŭstralio estis, ke ĝi estas (15) lando sunbruligata (8) pro senpluveco, lando de velkinta (8) terofruktaĵo, mortantaj (8) brutoj, senkuraĝiĝintaj (8) kolonianoj, kaj grandaj riveroj malaperantaj (8) neniu scias kien. Senesperigantaj (8) kolonianoj sugestis ekspedicion por trovi la grandan internlandan (9) maron, ĉar teoriistoj asertis, ke devas esti tia komuna buŝo de ĉiuj riveroj fluantaj (8) internen. Oni donis la estrecon de la ekspedicio al Sturt kaj la subestrecon al Hamilton Hume (pron. hjum).

Kompare kun pli modernaj ekspedicioj por landesplorado tiu de Sturt estis tre malbone ekipita. Krom la estroj ĝi konsistis el du soldatoj, ok punlaboraj krimuloj, dek kvin ĉevaloj, dek bovoj kaj boato sur radoj. La dudek-sesan de Julio de la jaro dek-okcent-dudek-oka la ekspedicio pasis preter la monto Harris kaj daŭrigis la vojaĝon sur malalta vasto de marĉa dezerto ĝis kiam danĝeraj ŝlimajoj kaj pikaj kanoj malebligis ĝin iri pli antaŭen. En la bruliganta Decembro varmego de Meza Aŭstralio Sturt (10) penege marŝis tra alternajn zonojn (11) de arbetoj kaj marĉo kaj fine trafis (12) rivereton, kiun li nomis New Year Creek (pron. nju jir krik, t.e. Novjara Rivereto). De tie li marŝis al kruta, izola monteto, esperante (7), ke de sur ĝi li havos grandan perspektivon al la okcidento. De la supro de la monteto, kiun li nomis Oxley's Tableland (pron. okzlejs tejbeland, t.e. Altpataĵo de Oxley)

li vidis nur sunbruligatan ebenaĵon sin etendantan (8) ĝis la horizonto. Senkuragiĝinta pro la senakva dezerto, Sturt iris returne (13) al New Year Creek kaj dum kelke da tagoj marsis laŭflue de tiu rivereto. Oni imagu liajn senliman ĝojon kaj miregon, kiam li neatendinte trovis, ke la rivereto fluas (14) en grandegan riveron, kiun li nomis Darling. Lia ĝojo mallonge daŭris, ĉar la akvo estis sala. Post kelke da tagoj da esplorado en la ĝirkaŭanta tero nesufiĉeco de trinkebla akvo devigis lin iri returne (13) al la monto Harris, kie atendis lin novaj provizaĵoj. La sepan de Marto li ree ekvojaĝis sekvonte (7) la sekan fluejon de la rivero Castlereagh (pron. kasel-rej).

NOTARO 13.

1. Figura uzo de "ofer".—2. Vidado aŭ vidpovo aŭ vidkapablo.—3. La vortoj en la teksto nur signifas "was born".—4. aŭ mil - septcent - naŭdek-kvina.—5. Ne esperantigu nomojn de modernaj personoj, firmoj, kompanioj, gazetoj, ktp.—6. jen....jen, sometimes.... at other times. Cox pĝ 344 aŭ 356. Mill.—7. Adverba participo, Cox 211.—8. Adjektiva participo, Cox 209b.—9. Ne uzu "enlanda" en tiu senco, ĉar ĝi havas nesaman signifon.—10. La teksto lasas dubon ĉu de tie Sturt marsis sola aŭ akompanata de la aliaj ekspedicianoj.—11. Akuzativo, tial ke li eniris ĉe unu flanko kaj eliris ĉe kontraŭa flanko.—12. trafis, came upon, struck.—13. Kvankam la prefikso remultloke troviĝas en la senco de "back," tamen estas bone distingi inter "re-" (again) kaj "returne" (back).—14. "fluas" (ne "fluis"), Cox 220, 221. Oni notu, ke en Cox 221 la vortoj "of speaking" devas esti "spoken of".—15. "estas" (ne "estis"). Vidu noton 14.

TO THOSE WHO SUPPORT

We again give our thanks. How welcome is their help! We earnestly appeal to all lapsed or due subscribers in the hope that they will, at the eleventh hour, save the Suda from the embarrassment of a further deficit at the year-end. There is a sum of some £20 outstanding—owed by persons regularly receiving the gazette. Were this to be paid this month, the S.K. would appear in 12 pages through 1931.

F-ino M. Krass, 4/6, julio, '31; s-ro A. Grieser, 5/-, sept., '31; s-ino M. Dunne, 4/6, majo, '31; f-ino M. Helm, 6/6, dec., '31; s-ro J. Rogers, 4/6 junio, '31; s-ro J. Lawson, 9/-, aŭg., '31; s-ro

F. Luhnning, 5/-, dec., '31; f-ino J. Pollock, 5/-, julio, '31; s-ro J. Scurrie, 4/6, feb., '32; s-ro F. Bury, 4/6, dec., '31; s-ino G. Livy, 13/6, dec., '30; kaj 6p. donaco. Ensume: £37/-.

LA SUDA KRUCO As a Christmas Present.

Have you an Esperantist friend who is not a subscriber to La Suda KrucO, and to whom you customarily send some small token of remembrance at Christmas? We believe you have. Why not surprise him or her by arranging to have a copy sent every month in 1931? By so doing you would at once bestow an acceptable little gift, and render sorely needed service to the only Esperanto organ in the Southern Hemisphere.

TO CONTRIBUTORS.

All literary contributions to us must be accompanied by the name and address of the sender, whether for publication or not. It is impolitic to print matter the author of which could not, in case of necessity, be traced. Of course, pen names may be appended to the lines or they may appear over no signature at all, but the Redakcio must know the truth as to their origin.

ACCOUNTANTS & ESPERANTO.

The International Accountants' Corporation and Bookkeepers' Institute, "established by membership of some 3000 in nearly every country on earth, with 83 registrars' offices throughout the world," has adopted Esperanto.

The Council feels that it should do more than formally accept the language; so five of the officers and staff out of twelve on the permanent staff at the International Head Office (Capitol Bldg., Melb.) are learning Esperanto. The language will be used considerably in the head office.

The Institute's gazette, "International Accountants' Journal," circulates in 60 countries. Its editor hopes at a later date to publish a regular page of Esperanto each month. The Sept. number contains a fine article by Bernard Long on the educational value of Esperanto, reprinted from "International Language."

THE STORY OF ANDREE in Esperanto!

Through La Eldona Societo Esperanta, Stockholm, the story of the Andree North-polar tragedy of 1898 will appear in Esperanto, simultaneously

with versions in nine other languages. The book, in the main a translation of Major Andree's diary, is priced at about ten shillings, and should prove to be an imposing volume. Inquire at B.E.A.

SKANDERBEG: THE ALBANIAN NATIONAL HERO.

Skanderbeg (a Turkish corruption of the name of Prince Alexander—Iskander—Skander Beg) is the subject of the first book in Esperanto to be printed in Albania. It is being published privately by the author in Scutari at the price of 2.50 Swiss francs for 144 pages. It is an inspiring story of a remarkable man, whose life reads like fiction, so numerous and exciting were his adventures as the champion of Albanian Christianity against the Moslem Turks. The book is enriched by a graceful tribute to the internationality of Esperanto, in the form of a foreword by a Czechoslovakian, Professor Lukas.

ESPERANTO IN NEW YORK CLINIC.

Dr. Robert Rubinstein (New York) says a little learning is a useful thing. He writes to the "Internacia Medicina Revuo" as follows: In New York's foreign quarter the patients of our clinic are for the most part indigent and uneducated, and so, as may be expected, language difficulties present themselves almost daily. This results in the loss of much valuable time before we can obtain sufficient personal information to make a satisfactory diagnosis. Many tongues are heard in the clinic. Often we must use some other patient as an interpreter, but not always successfully. I have found Esperanto of frequent help, especially with Spanish and Italian visitors; for example, they always understand me when I say to them "Respiru profunde," or "Stomakdoloro?" or "Apetito bona?" or "Dormas dum la nokto?". They never fail to answer intelligently. The world may think that the English language is all-sufficient in North America. Hard facts prove the contrary.

DU MAJSTRO-NOVELOJ de Theodor Storm

trad. elgermane H. Heitmüller eld. "Heroldo de Esp.," Koln.

Estus helpdone kaj interese, se la tradukantoj metus antaŭparole la nomojn de tiuj nacilingvoj, en kiujn la konkerna verko jam tradukiĝis. Ekzemple, ĉu en la angla estas trovebla ĉi-duo de

noveloj de Storm, verkisto tiel ŝatata de germanoj?

Li ne apartenas al iu ultramoderna literatura skolo; el jaroj 1817-88 li altiras, penas tiratente rememorigi nin pri sia skribepoko, pri tagoj antaŭ ol floradis la animesploremaj romanistoj. la prilumistoj palpe serĉantaj la kavernojn de l' homa psiko.

Storm rakontas la historion de Haŭke Haien, studama knabo, kiu leviĝis ambicie ĝis tio, ke li okupis la enviatan oficon de digografo. Kontraŭstarantojn li devas rebati; liaj ideoj naskas disputojn inter lokanoj. Sur sia blanka ĉevalo li kaj la familio, pro rompiĝanta digo, malaperas finfine en la mangavidan faŭkon de l' maro. Inter frizanoj floris el tio stranga lredo nome, ke blankĉevala vizio kun akompanantaj misteroj aperas iam kaj iam ĉe la diga marbordo.

Ĝi estas leginda vortbildaro de frizona vivo, de konstanta devo vigli kontraŭ la eterne minacanta maro norda. La persista Haŭke elpuŝas el ni admiron al sia forta karaktero. Ni feliĉas kun li en ĉia sukceso. Plaĉe estas, ke lia virbrava koro amvenkas la beletan Elke, ke li meritante akirprenas digografan oficon honorindan! Lerte desegnitaj skizoj el simpla popolo, vivanta apud komuna malamiko, la Marmoloĥo. Ludas sinsekve sur la intereso-sento la "Geest"-konkurso, la paganmoro enterigi vivaĵon ĉe digfondo, kaj la rakontferma tragedio de l' inundo.

La stilo estas plejparte bona, tamen oni kelkajn teksterojn povus pli lerte reverki, en kiuj kolormanke ĝi treniĝas aŭ estas karakterizata de nebona frazkonstruo. Bonekte uzante adverbojn kaj adjektivojn la tradukinto evitus trouzon de -eg sur paĝo 114. "...la besto rapidegis tien. La ventego blovegis el la flanko, Kelkfoje la ekpuŝegoj premis tiel furioze, ke ili preskaŭ ĵetegis ĉevalon..."

Ni volas protesti tamen kontraŭ dono al fundamentaj radikoj ankoraŭ alian signifon, "gest", "marŝ". "Konfid" misuzata. Tro da kunmetitaj verbtenupej. "Holandan lingvon ambaŭ ne scipovis (...scipovis nek unu nek la alia); Nebona ellaso de personaj pronomoj kaj korelativoj:—Li ekkonis, ke (ĝi) estas ŝi. Li strangolis ĝin (tiel). ke ĝiaj okuloj elkaviĝis"; 33/3. "Li aŭdis, kiel ...la kokoj kriis (krias)". Denove la stranga gramatikaĵo, "antaŭe nomito" (antaŭe nomita); "ĵus enterigito" (ĵusa, aŭ enterigita). "Avanciĝi" (Zamenhof, "promocii"),

aliloke la trad. uzas la plibonan "grad-alt". 51/1-4. Neklara tradukero. 67/32 "tiel ke" (tial); "frakturo"?; 93, memstare sidis? Tro ofta entruado de sufikso -em. Domaĝ' (difekt')? ne jam (ankoraŭ ne); "la alia mateno" (la sekva mateno). Interpunkcio sur unuaj naŭ paĝoj laŭ Zamenhofa metodo sed ne poste.

La dua rakonto atentotiras pro edziĝ-problemo. Unuinfana vidvo prenas al si denove edzinon. Ne prosperas al ĉi tiu amigi al si la edzinon (edzan filineton). La viro konsilas la amatinon, "ne postuli de la infano ion kontraŭnature." Li diras, aldone, ke ŝi povus esti vera patrino nur al infano, de ŝi naskita. Argumente le virino rebatas, ke ŝi ja fariĝis sia amrajta patrino en tiu sama grado, kia ŝi fariĝis lia amrajta edzino. Se la unua ne estas vera, la dua ankaŭ ne!

Valora kontribuo al nia literaturo. Prezo: 2/6 ĉe B.E.A.—(Robo).

MASARYK

Malriĉa knabo, kiu gloriĝis.

La ĉeĥoj amas sian prezidanton, paĉjon de ilia lando. La supretitolita libro donas ankoraŭ ateston pri la popola volo elesprimi la sentatan adoron al tiu vere kuraĝa kaj talenta ŝtatogvidanto. kiun Lloyd-George nomis "la plej granda politikisto en la nuna Eŭropo." La aŭtoro, d-ro J. Herben, bildigas rakonte lian vivhistorion ekde infaneco. Filo de veturigisto, li fariĝis, dank'al sia akra moralsento kaj alta vivcelo, profesoro, aktivulo por la formiĝanta ĉeĥa ŝtato, kaj finfine ties aklamata ĉefministro.

Ho se eldonistoj ĝenerale bindus tia-maniere, ke la folioj ne dis-eriĝas por nura tuŝo. Estas ĝene, serĉi subtable forflugintajn librerojn! La stilo estas bona, sed preseraroj iom tre ofte makulas. La tradukintoj, Moraviaj Esperanto-Pioniroj, devis fari la laboron kun multe da rapideco, celante finon jam ĝis la nasktago de la ŝtatprezidanto; la preskorektisto samkiale ne sukcesis laboro tiel precize, kiel ĉe la dramo "R.U.R."

Tiu ĉi interesa kaj valora libro 136-paĝa indas duan eldonon, sed nepre nur unuecigite el vortuza flanko (forigo de duoblaj formoj, kiaj orienta, orientala, socia, sociala), kaj kelkloke glatigite ĉe iom nekompreneblaj frazoj. Prezo 2/6 ĉe B.E.A.—(Robo).

JUNECO KAJ AMO originalaĵo de Ed. Payson.

S-ro Payson, malgraŭ sia honorinda multjareco, estas laŭspirite juna kaj ankoraŭ klare tenas memore la rozojn kaj dornojn de l' vivburĝono, ĝiajn ravojn kaj dolorojn. Jen "legendo el Venecio," libreto en kiu la okuloj vagas paŝon post paŝo tra melodilingga priskribo de orlumata blu-mar-itala, pitoreska kanalaro flankita per malnovmondaj loĝejoj; aŭdiĝas plaŭdo muzika de la gondolista braklaboro, la elfingrita gitarvoĉo de amanto.

La temo de tiu ĵus eldonita originalo kaj ties varmsanga pritrakto rajtigas nin supozi, ke iu amrevanta dekok-somerulo verkiste elpuŝas krion de senluziĝo pri ino perfidinta. Gratulon al nia enviinda idefrato, jam konata Esperantronde pro siaj ĝue legataj tradukaĵoj.

Verkita en tre laŭdinde klasika stilo, la dek ĉapitroj formas tragedion pri iom tre ofte uzata temo. Du amikoj. Unu forlogas de la alia la belulinon ligitan de l' amŝnuro nesufiĉe forta. Sangobolo, venĝosoifo, morto de unu el la persontrio. Kiu?

Nepaĝnombrita. Bele broŝurita el forta papero, la verketo estas de The Esperanto Publishing Co. eldonita. Prezo 1/6p.—(Robo).

ĈU TEORION Aŭ PRAKTIKON?

En Ĝenevo (20-3—2-4-30) kolektiĝis certaj famaj filologoj, laŭ la invito de International Auxiliary Language Association..., por honeste esplori la demandon pri internacia helplingvo. Eble, vi kredus, ke ili faris miraklojn. Absolute ne! Tiuj 19 altgradaj kompetentuloj, post dusemajna debato kaj peniga diskuto, konsentis ellabori deklaron, kaj koron en paco, ĝin prezentas al la

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiginto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco. Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

publiko.

Ni eltiros por niaj legantoj la 3-an punkton de la deklaro, kiu, certe, provokos justan proteston, flanke de ĉiu Esperantisto. Tralegu tiun ĉi gemaĵon:

Ili (la 19 kompetentuloj) opinias, ke ĉiu sistemo (artefarita lingvo) prezentas certajn proprajn bonaĵojn, sed neniu povas pretendi je perfekteco, sekve de kio iu decido celanta determini definitive la lingvon internacian de l' estonteco ŝajnas esti ankoraŭ tro frutempa.

Jen kian geniaĵon ellaboris tiuj famuloj teoriistoj. Ili konsideris tiun gravan demandon aŭ facilanime aŭ kun troa prudento, sen ia ajn logika penso. La tuta punktaro de la deklaro estas ridinda kaj nete sensenca. La kulminacio de sensenco, tamen, entenigas en la supra citaĵo. Kio povas pretendi esti perfekta? Kaj kiam oni imagas, ke unu el la ses (jam ses! kiom la fabrikado de artlingvoj estas alloga!?) sistemoj atingos perfektecon? La naciaj lingvoj, vivantaj jam centojn da jaroj, ne ankoraŭ atingis perfektecon kaj tian ili neniam havos, kiel ĉiu surteraĵo. La definitiva determino de la estonta lingvo internacia ŝajnas esti ankoraŭ tro frutempa!? Se ĝia sorto estus en la manoj de tiaj parolistoj, ĝia determino ŝajnus esti ankoraŭ tro frutempa en la 3030-a jaro.

Feliĉe, la 19 deklarintoj kaj ilia deklaro povas neniel influi la daŭran venkmarŝon de Esperanto, kiu disvastiĝas kaj fine triumfos sen ilia opinio aŭ konsento. Kaj kian utilon havus Esperanto, eĉ se ili rekte fiksus ĝin internacia? Tute nenian! 19 personoj povas nenion fari per siaj vanaj paroloj kaj eternaj teorioj. Malkonsideri nian lingvon, estas afero malserioza kaj precipe, stulta. Ignori la praktikon, estas nepardonebla ago por personoj, kiel niaj 19 juĝistoj, kiuj faris nemenditan laboron.

Ĉar ne estus eble, ke personoj povu fabrikii tian ridindan deklaron, se ili sciis, ke Esperanto jam vivas dum preskaŭ duonjarcento, ke ĝin parolas

miloj kaj miloj da personoj, ke ĝiaj ĵurnalaro kaj literaturo rimarkinde kreskis kaj pliriĉiĝis, ke, entute, la nura praktiko de la lingvo mem kapablis formi ĝian tiom longan historion. Ne, neniam teorio valoras la praktikon. Ne estas do necese maltrankviliĝi pro la senbaza decido de tiuj multsciantoj. Post la dorso de Esperanto staras la granita persisto kaj fera kredo de ĝiaj adeptoj—ili formas la popolan voĉon, kiun oni obeos.

Estas tre bedaŭrinde, ke el la 19 teoriistoj troviĝas tri esperantistoj, kiuj akceptis subskribi tian sensencaĵon, spite al la praktika valoro de nia lingvo, kies spirito ili eble ne konas.

V. M. SISKOV, en "Oomooto Internacia."

PRI INDIGENA "OSTOMON-TRADO."

La internolandaj indigenoj de Aŭstralio ankoraŭ praktikas la sorĉarton. En Adelaide, ĉefurbo de ŝtato Sud-Aŭstralio, indigeno efektive restas en dumviva mallibereco pro mortigo al "lubra" (indigena virino), kion li faris, revenĝante pro "ostomontrado" (minaca gesto aŭ celo al iu per ostoj). Sendube li estas forte konfuzita pro la konfliktaĵoj. Lia faro estas tute permesata—laŭ tria leĝo, kaj verdire li ne sciis pri ia alia. Ostomontrado estas kutimo ĝenerale praktikata ĉe la tribanoj, kaj konsistas en ago, montri ostojn al individuo al kiu oni volas malbonon. Tre povas esti, ke la celito malsaniĝos kaj mortos,—precipe se tiu suspektas ian sorĉaĵon. Parencado de mortinto tiam venĝas perfortege. Laŭ leĝo de la indigeno, tio estas justa homomortigo, sed laŭ blankula leĝo, ĝi estas krimo meritanta punon.—Trad. Godoko.

RUZE!

Ĉu via filino jam kutimiĝis al la okulvitro?

Bedaŭrinde, ne! Ŝi ilin tute malamas! Dumtage mi neniel povas konsentigi ŝin surporti ilin; tamen, feliĉe estas, ke, tuj kiam ŝi endormiĝas, mi piedpinte ŝtelmetas ilin al ŝi sur la nazeton.

PERCY HOLMES ELEKTRISTO KAJ RADIISTO. 212 NOONE-STR., CLIFTON HILL.

Prezentas al vi novan radi-aparaton. La "VERDASTELO" maŝino estas speciale konstruita por la Esperantistaro, kaj estas havebla laŭ diversaj ampleksoj, kiuj entenas de du ĝis ses valvoj. Aŭskultu ĝin en propra hejmo via!

MEMORU—POR ĈIO ELEKTRA.

Telefonu: JW 4017.

PRI "MORTIĜI".

En "La Rivista Italiana di Esp-o" prof-o Mazzolini volus anstataŭigi "mortiĝi" per "morti" (p. 16 Fund. Krest.). Evidente li ne scias, ke Zamenhof intence donis la formon kun -iĝ kiel mezformon inter aktiva kaj pasiva. La tuta frazo klare montras tion. Oni uzas la pasivon, kiam la aganto estas montrata, sed la formon kun -iĝ, kiam la aganto ne estas montrata aŭ ne estas vivanta aŭ estas negrava. Oni diras aktive "Johano mortiĝis Karlon" kaj pasive "Johano estis mortigita de Johano," sed en la citita frazo de Ekzercaro la kaŭzo de la morto de la onklo estis la falo sub...., kaj oni ne pensas pri la radoj kiel aganto. Oni ne diras "li estis mortigita de radoj." En la angla oni diras "he was (got) killed"—li mortiĝis. Oni diras "li mortiĝis en batalo"—he was (got) killed in battle, ne "li estis mortigita de malamiko en batalo." Rimarku plue: Li falis de sur arbo kaj mortiĝis.—He fell from a tree and was (got) killed. (Ne estas aganto). Tiel same pri "sciigi" kaj aliaj.

RECENZO.

"Kaj ĉio restas penso sed ne faro." bagatela broŝureto de L. Sinha, eld. de Eldona Societo Esperanto, Stockholm, pri preskaŭ forfrotita Esp.-temo, iom tre nebone lingvovestita. Kontribuas nenion novan al la koncerna penskampoj.

Eraroj kaj nebonaĵoj: p. 4/14, Budhistaj monaĥoj alportis iliajn (siajn) evangeliojn; Hinduoj estis ekkonata al (de) la Okcidenta mondo; larĝa en areo (granda, ampleksa); insuloj, pri kiu(j). 5. La rilato ne songita antaŭe fondiĝis (ne antaŭe songita fondiĝis). 6. La aŭtora tradukero biblia ne superas la modelan tekston; 8, 9 verbtempoj fuŝe uzitaj; ignoro (nescio); opiumo (opio). 12, lia inspiro ne limigas al iu aĝo kaj raso (—ne limiĝas al iu historia tempo aŭ raso?); 13/2, 3, 4, iliaj (siaj); tiel certa kiel (tio), ke Dio estas Dio. 15 estonto (estonteco).

PRI "RESPEKTIVE".

El "Heroldo de E." (n-ro 30(578) en 2a kaj 3a kolonoj de pĝ 1 okazas la vorto, ŝajne en la senco "or," sed dubinde estas, ke tia uzo estas aŭtoritata. "Konstanta sekretario, respektive sekretariino, kontrolas la gazetojn pri novaĵoj." "Sube estas citita la nomo de la verkinto, respektive tradukinto." Ĉi tie "respektive" ŝajne havas la sencon

"or.....as the case may be."

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, s-ro H. Franks, 38 Worksoy-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikajojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FB.E.A. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.